

# LABORISTA ESPERANTA MOVADO ANTAŬ LA MONDMILITO

Faktoj kaj dokumentoj kolektitaj  
de G. P. de Bruin



*PARIZO 1936*

---

*SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA*

## ANTAŬPAROLO.

Antaŭ proksimume deko da jaroj mi iniciatis por la *SAT-Jarlibro* historian skizeton pri la unuaj jaroj de la laborista esperanto-movado. Tiam la gvidanto de *SAT*, k-do *E. Lanti*, konsilis al mi verki pli detalan, pli kompletan priskribon kaj sekve de tio mi ekokupis min pri la estinteco de nia movado. Pro hazardaj cirkonstancoj kaj per helpo de diverslandaj kamaradoj, mi sukcesis kolekti kvanton da historia materialo, kiu ebligis al mi skizi iom detalan bildon de la antaŭmilita laborista esperanto-movado. Ĉi tiu skizo aperis en *La Nova Epoko* (jarkolekto 1930—31).

Ŝajnas al mi, ke nun, kiam pasis ĉirkaŭ 25 jaroj post la fondiĝo de la unuaj laboristaj esperanto-asocioj en Bohemio (Ĉeĥoslovakio), Germanio kaj Nederlando, estas konvena momento por konigi ĉi tiun skizon en pli vasta rondo. Pro tio ĝi nun aperas en libra formo, kaj kun la espero, ke ĝi veku intereson pri la pasinteco de nia movado kaj pri la laboro de ĝiaj pioniroj, mi ĝin transdonas al la legontoj.

*G. P. de Bruin.*

*Enschede, somero 1936.*  
Nederlando.

## ENKONDUKO.

En 1887 d-ro L. L. *Zamenhof* publikigis sian esperanton. Juna, nekonata kuracisto, ne-filologo pretendis doni al la homaro lingvon internacian, kiu ebligus al diverslingvanoj kompreni unu la alian kaj kiu preparus neŭtralan fundamenton por interfratiĝo de la disaj, interbatalantaj homaj gentoj. Multaj mokis la ideojn de ĉi tiu nepraktika homo kaj ridis pri lia ĥimera projekto. Sed ne ĉiuj. Idealistoj diverslandaj, malmultaj laŭ nombro, sed profunde sentantaj la senkomparan valoron de universala interkomprenilo, esploris la projekton kaj konkludis, ke ĝi estas taŭga. Ili proprigis al si la lingvon kaj iĝis ĝiaj fervoraj adeptoj, kiuj kun multe da amo kaj sindono varbis por la grandioza ideo. Tiel estiĝis la komenco de la esperanta movado.

Kiuj estis la unuaj pioniroj de la movado esperantista? Ili estis ĉefe personoj el la mezaj klasoj: inĝenieroj, instruistoj, kuracistoj, oficistoj, k. s. Ĉu ankaŭ laboristoj estis inter ili, pri tio ne ekzistas informoj.

Sed kiam do laboristoj envicigis sin en tiu modesta aro da esperanto-pioniroj? Kiuj estis tiuj simplaj proletoj, kiuj la unuaj ekkomprenis la utilon de esperanto kaj propagandis la novan lingvon?

Ni ne scias. Supozeble en la unuaj jaroj post 1900 en kelkaj lokoj progresemaj laboristoj en kursoj de neŭtralaj organizoj lernis la lingvon kaj provizore aliĝis al la neŭtrala movado. Nur poste, kiam, precipe en la grandurboj, iom pligrandiĝis la nombro da laboristaj esperantistoj, ili kunigis sin kaj tiel estiĝis la unuaj laboristaj esperanto-grupoj (1905—10). Pli poste ĉi tiuj grupoj organizis sin laŭnacie en *Laboristaj Esperanto-Asocioj (LEA-oj)*. Kiel kaj kiam tio okazis, kion faris la LEA-oj, kiuj ludis en ili gvidan rolon kaj kio okazis en la laborista esperanta movado sur internacia kampo, pri tio informos la sekvontaj paĝoj.

---

## EN BRITIO.

En Britio la laborista esperanto-movado neniam prosperis tre bone. Estas malfacile difini la kaŭzon de tio. Oni povus supozi, ke la grava pozicio de la angla lingvo en la monda trafiko malfavore influis la propagandon de esperanto. Sed en tiu okazo ankaŭ la neŭtrala movado devus suferi la sekvojn de tio. Ĉi tiu estas tamen sufiĉe forta kaj influa, el kio montriĝas, ke la neprospero de laborista esperanto-movado estas kaŭzata de faktoroj, kiuj ne validas por la neŭtrala movado. Kiuj estis ĉi tiuj faktoroj, kiuj kaŭzis, ke en ĉi tiu lando kun grandindustrio, kun sufiĉe fortaj laborista partio kaj sindikata movado, la lingvo esperanto ne trovis pli da adeptoj, estas demando, kiun ni ne kapablas respondi.

Pri la brita movado oni ne povas rakonti multon. Detaloj pri la agado de ĝiaj unuaj pioniroj, pri fondiĝo kaj funkciado de la unuaj grupoj tute mankas.

En preskaŭ ĉiuj landoj fondiĝis komence lokaj grupoj kaj poste la landa asocio. En Britio okazis inverse. Tie oni starigis jam en 1907 la *Britan Ligon de Esperantistaj Socialistoj (BLES)* kaj nur poste estiĝis lokaj grupoj.

Pri la agado de BLES ni ne estas bone informitaj. Ĝi sendis al la *Internacia Socialista Oficejo*, la tiama centro de la socialistaj partioj, petskribon pledantan por la akcepto de esperanto ĉe ties internaciaj kongresoj kaj kunvenoj. Ankaŭ ĝi direktis cirkuleron pri esperanto al la laboristaj reprezentantoj en la parlamento kaj ricevis de kelkaj el ili favoran respondon. Plue ĝi delegis esperantiston al la Internacia Socialista Kongreso en Kopenhago en 1910. Ĉu tiu delegito tie povis fari ion utilan, pri tio mankas informoj.

La unuaj gazetoj, kiuj propagandis esperanton estis *Clarion* de R. Blatchfort kaj la anarkista gazeto *Freedom* (Libero). La unua eĉ havis regulan esperanto-rubrikon, al kiu i. a. kunlaboris W. Nutters el Amsterdamo. En la eldonejo de *Freedom* aperis propaganda broŝuro *Anarchists and the international language Esperanto* (Anarkistoj kaj la int. lingvo Esperanto). Supozeble ĝi estis traduko de la samtitola franclingva broŝuro de E. Chapelier & Gassy Marin. (P. Stojan nomas ĝin en sia *Bibliografio de Int. Lingvo*, sed en la esperantogazetaro el tiu tempo oni ne trovas mencion pri ĝi.)

La unua sekretario de BLES estis *Helen Fryer*. Ĉi tiu kamaradino laboris multe por la Ligo. Ŝi verkis ankaŭ lernolibron por anglo-lingvanoj, speciale por ne-gramatikuloj. Kel-

kaj aliaj aktivuloj el la brita movado estis: *P. J. Cameron*, *J. Holt*, *J. Hoyle*, kunlaboranto al *Internacia Socia Revuo (ISR)*,\*) *H. Hyams* (pseŭdonime: Tagulo), kunlaboranto al diversaj gazetoj, *W. Padfield*, kunlaboranto al ISR kaj partoprenanto al kelkaj ruĝulaj kongresetoj kaj *Y. Yelland*, kunlaboranto al ISR.

---

## EN ĈEĤOSLOVAKIO.

La unua propagandisto de esperanto en ĉi tiu lando, tiutempe ankoraŭ nomita Bohemio, estis *F. V. Lorentz*, redaktoro de la gazeto *Zar* (Brilo), kiu en 1890 eldonis la unuan ĉeĥlingvan lernolibron. Bedaŭrinde ĉi tiu pioniro pro politika persekuto devis forlasi la landon kaj pro tio la de li komencita propagando ne estis daŭrigata.

Nur en 1900 progresema instruisto *Th. Cejka* rekomencis la propagandon kaj dank' al li kaj al aliaj pioniroj la lingvo iom post iom plikonatiĝis.

La unua signo de la disvastigo de esperanto inter la laboristoj estis, ke en la naŭa kongreso de la bohem-slava socialdemokrata partio estis proponate rekomendi esperanton al la laboristaro. Ŝajne la tempo estis ankoraŭ ne matura por tio, almenaŭ la malaprobo de unu el la gvidantoj sufiĉis por malakceptigi la proponon. \*\*)

Sed — stranga fakto — unu jaron poste, en 1911, la kongreso de la sama partio "unuanime rekomendis al la bohemaj laboristoj la propagandon de esperanto"! \*\*\*)

Do, rapide ŝanĝiĝis la situacio. Ĉu ni devas supozi, ke en unu jaro la influo de esperanto en laboristaj rondoj tiom kreskis? Se jes, kiel do okazis ĉi tio? Kiuj ludis ĉefan rolon en tiu progresigo? Ĉi tiujn demandojn ni ne povas respondi. Ni scias nur, ke en septembro 1911 fondiĝis la *Laborista Esperantista Asocio*, sekcio de la Laborista Akademio en Prago (Praha). Estraranoj estis: *F. J. Chaloupecky*, *A. Hais*, *R. Sada*, *J. Šidlo* kaj *F. Vaneck*. Ĝia starpunkto estis socialde-

---

\*) Vidu la koncernan ĉapitron.

\*\*) *Le Travailleur Esperantiste*, julio 1914.

\*\*\*) *Kulturo*, jan. 1912.

mokrata. En la sama jaro okazis la unua kongreso de la asocio, kiun ĉeestis pli ol cent kamaradoj. Krom raportado pri agado, organizado kaj taktiko, okazis paroladoj pri "Elkiĝo, evoluo kaj historio de la lingvo internacia", pri "Praktika signifo de esperanto por la laboristaro" kaj pri "Esperantismo kaj socialismo".

Kiel principdeklaron oni akceptis ĉi suban rezolucion: \*)

Ni volas propagandi la ideon de la tutmonda internacia lingvo inter laboristaro, divastigadi ideon de socialismo inter la esperantistaro, pere de esperanto esti utilaj al la bohema laboristaro okaze diversaj praktikaj interrilatoj je fremdlando, informadi vere la transliman publikon, precipe samcelanan, pri la vivo kaj penado de la bohema proletariato; en la interna evolucio de esperanto influi kiel elemento konserviga kaj fariĝi tiel gardantaro de ĝia natura, neperforta evoluado, klopodi por aprobigi esperanton kiel interlingvon de socialista Internacio por laŭbezona diversnacia interrilatigado, precipe en internacia socialista kancelario kaj okaze de universalaj kongresoj de Internacio, same kiel en por informaj gazetaro kaj publikaĵoj eldonataj de Internacio al proletariato de la tuta mondo. Subtenate de nia politika partio, bohemsblava sociala demokratio, agitadi por aprobo kaj akcepto de esperanto en korporacioj legodonaj kaj por ĝia enkonduko en lernejaron en nia tuta diverslingva ŝtato. Nia cetera programo devenas jam evidente el tiuj ĉi sep postuloj fundamentaj. \*\*)

En la komenco de 1912 la asocio aperigis ĉiumonatan gazeton *Kulturo*. Ĉi tiu gazeto kompreneble ankaŭ respegulis la revolucion starpunkton de la organizo. Klare ĝi estas esprimita en la gvidartikolo "Nia programo" en la unua numero.

Unue ni estas socialistoj,  
poste esperantistoj.

Ni propagandas la lingvon internacian inter la bohema laboristaro, simple por doni al ĝi novan praktikan rimedon por senpera interrilato kun laboristaro de la cetera mondo. Ni alportos al bohemaj laboristoj multan originalan, interesan raporton pri vivo kaj klopodo de fremdaj samcelanoj kaj samtempe ni informos la fremdujon pri individuaj bezonoj de proletariato bohema.

*Nia unua celo estos do la praktika eluzo de esperanto en servoj de internacia socialismo.*

---

\*) En ĉi tiu kaj sekvontaj citaĵoj ni ne ŝanĝis la lingvaĵon de la originalo.

\*\*) *Kulturo*, jan. 1912.

Nia plua fervora sopiro estos enkonduko de novaj direktoj en la ĝisnunan evolucion de esperantista movado, la *renaskigo de esperantismo per socialismo*.

Ni ĉiam intensive defendos la principon, ke la politika kaj kultura konvinko ne estas ĉe esperantisto afero privata kaj sen-signifa, sed ĉiam ni proklamados, ke la vera esperantismo kiel maturiĝinta ideo povas esti nur parto de ĝenerala pensmaniero de la homo sincie progresema, antiklerikula, antinaciula, antimilitarista kaj socialista.

Tial — estante tute sendependaj de burĝaj esperantistoj — ni propagandos en Bohemujo nian propran opinion pri historia tasko kaj signifo de la lingvo internacia ne respektante la cirkonstancojn, ke ni naĝas kontraŭ fluo.

*Kulturo* okupis inter la tiamaj laboristaj esperantaj gazetoj tute apartan lokon. Revolucia ĝi estis. Aŭdu, kiel ĝi kritikis la neŭtralajn kongresojn:

Dudek kvin jarojn ekzistas jam esperanta movado. Dudek kvin jarojn ĝiaj pioniroj klopodas starigi ion grandiozan, mondogonton, sed ĝis nun ili ne sukcesis aranĝi eĉ simplan efektive laboran kunvenon. Lasta VIII kongresego tion terure dokumentas. Bonvenado kaj fama "babilado", ekskurso, balo, teatro, fiservema glorumado de modesta persono de Zamenhof, kelke da senprogramaj "laboraj" kunsidoj kaj kanto de naŭva himno pri "pacaj batalantoj": tio estas ĉio, kio okazas dum tia tutmonda kunvenego esperantista — kaj laŭ tio aspektas poste tuta esperanta movado (ĝenerale. \*)

Klare ĝi difinis la starpunkton de laboristaj esperantistoj:

Por ni lingvo internacia ne estas *celo*, kun kiu finas nia penado, sed nur *rimedo*, per kiu ni batalas por ideoj multe pli altaj. \*)

Ĝi aljuĝis al esperanto jam pli gravan rolon ol tiu de help-lingvo. Kuraĝe ĝi skribas, laŭ la ideoj de la nunaj sennaciistoj:

Movado socialdemokrata same kiel anarĥista povas esti nur tutmonda; ĝi nepre devas forigi la limojn de historiaj ŝtatoj. Restos nur lingvaj limoj inter naciaro, kaj tiujn paŝo post paŝo povos forigi nur lingvo internacia, kiu tamen ne restos eterne *dua* lingvo, sed baldaŭ fariĝos lingvo *unua* por ĉiuj.

Ankaŭ sur lingva kampo *Kulturo* estis revolucia: ĝi jam uzis apud -ujo kaj -lando ankaŭ la landnoman finaĵon -io.

Tamen la bohemaj laboristaj esperantistoj ne nur klopodis iom revoluciigi la laboristan esperantan movadon, sed ankaŭ bone laboris *por* esperanto. Proksimume unu jaron post sia

---

\*) *Kulturo*, aŭg. 1912.

fondiĝo la asocio jam nombris ĉirkaŭ 500 membroj. Aperis flugfolio por laboristoj en kvanto de 10,000 ekzempleroj. Estis eldonata perletera kurso, kiu akiris preskaŭ 200 partoprenantojn. *Kulturo* havis eldonkvanton de 2,000 ekzempleroj. Krome estis komencata eldono de internacia laborista kantaro sur apartaj folioj. Aperis "La ruĝa standardo" de *Czerwinski* kaj "Mallibereja kanto" de *N. Zoula*.

*Kulturo* havis eĉ la honoron esti konfiskita! Ĝia deka numero (oktobro 1912) surhavas la komunikon: "Post konfisko dua korektita eldono". Ĝia ĉefartikolo titolita "Milito!" protestanta kontraŭ la balkana milito, enhavas blankan lokon. La redaktoroj tie enmetis rimarkon: "Konfiskita! Oni forgesis, ke ni vivas en Aŭstrio."

La lasta numero de *Kulturo* aperis en junio 1914.

---

## EN ĈINIO.

Laborista esperantista *movado* ne ekzistis en Ĉinio. Tamen estis tie intereso por esperanto inter socialistoj. Kelkaj el ili ne nur lernis la lingvon, sed ankaŭ aplikis ĝin praktike.

Aperis en Sanĥajo en la komenco de 1913 ĉiusemajna gazeto *Hina Socialisto*, eldonita en ĉina kaj esperanta lingvoj. Ĝi estis grandformata kaj ilustrita; la esperanta parto ne estis tre valora, sed la redakcio uzis ĝin por altiri eksterlandajn esperantistojn al kunlaborado. Ricevitaj korespondaĵoj kaj ankaŭ artikoloj el *Internacia Socia Revuo* aperis tradukitaj en la ĉinlingva parto de la gazeto. Kiom da numeroj eliris, ne estis konate. Redaktoro estis: *K. C. San*.

En aŭgusto 1913 ekeliris en Kantono alia gazeto, nome *La Voĉo de la popolo*, eldonata kaj redaktata de *Siŝo*. Ĝi estis anarkista, semajna kaj ampleksis 16 paĝojn, el kiuj 12 estis ĉinlingvaj kaj 4 esperantaj. La esperanta parto enhavis artikolojn pri situacio kaj okazintaĵoj en Ĉinio, pri anarkismo kaj kontraŭmilitismo, tradukaĵojn el verkoj de *Tolstoj*, *Bakunin* k. a. La ĉinlingva enhavo konsistis parte el artikoloj aŭ leteroj de diverslandaj kunlaborantoj tradukitaj ĉinlingven de la redaktoro.

*La Voĉo de la popolo* spertis multajn malfacilaĵojn. Post la



apero de du numeroj en Kantono ĝi estis malpermesata de la ĉina registaro. Tiam la eldonanto forkuris al Makaŭ (Portugala kolonio), sed ankaŭ tie li estis malhelpata, laŭ peto de la ĉina registaro. De tie *Sifo* transloĝiĝis al Ŝanhajo, kie li fine povis daŭrigi la eldonadon.

Estis do multaj malhelpoj. Malgraŭ ĉi tiuj, malgraŭ tio, ke mankis mono kaj ke la kunlaborantoj estis malmultaj, *Sifo* persistis. Li redaktis la gazeton, administris kaj presis ĝin. Ofte li estis malsana. Apenaŭ resaniĝinte, li reeklaboris por aperigi novan numeron de sia gazeto. Fine li iĝis grave malsana. Lia malriĉo ne permesis venigi kuraciston. La presmaŝinon, per kiu li propramane presis la gazeton, li ne volis vendi, ĉar ĝi laŭ lia diro estas la sola vivfonto de la anarkista ideo, kaj ĉar estus malutile vendi ĝin por savi unu personon. Poste per helpo de amikoj li estis transportata en hospitalon, sed tro malfrue. Li mortis la 27-an de marto 1915.

Sciante pri la cirkonstancoj, en kiuj *Sifo* aperigis sian gazeton, oni komprenas, ke ĝi ne eliris tute regule. Post lia morto ĝi vivis ankoraŭ kelkan tempon. En novembro 1916 aperis la 29-a numero. Ŝajne oni poste forlasis la esperantan parton.

Estas ankoraŭ raportinde, ke anarkist-komunistoj en Ŝanhajo proponis al la internacia anarkista kongreso, kiu okazus en 1914 en Londono, akcepti esperanton kiel oficialan internacian lingvon. Ili ankaŭ publikigis principdeklaron en esperanta lingvo.

---

## EN FRANCIO.

En la vintro de 1902—03 la franca sekcio de la *Asocio Internacia Kontraŭmilita* aranĝis, laŭ rekomendo de la en 1902 en Amsterdamo okazinta *Internacia Kontraŭmilita Kongreso*, kelkajn kursojn en esperanto. Ĉi tiuj kursoj liveris la unuajn laboristajn esperantistojn.

En 1905 fondiĝis en Parizo *Grupo Liberecana Esperantista*, kiu faris en tiu urbo la unuan propagandon en laboristaj rondo. Poste fondiĝis ankaŭ grupoj en Liono (Lyon), Marsejo (Marseille), Limoĝo (Limoges) kaj aliaj urboj. En la unuaj

jaroj ankaŭ la *Internacia Asocio Paco-Libereco\**), kiu dissendis cirkulerojn, eldonis broŝurojn kaj aranĝis propagando-kunvenojn kaj kursojn, multe propagandis.

Por labori en specialaj rondoj fondiĝis en 1910 *ESFIO* (*Esperanta Sekcio Franca de la Internaciista Organizaĵo*), kiu celis propagandi ĉe la Socialista Partio kaj en 1911 la *Sindikata Esperantista Federacio*, kies agadejo estis la sindikatista movado. *ESFIO* eldonis en 1912 esperantlingvan broŝuron: *Laborista Klaso kaj Socialismo*, de *M. Cachin*, tradukita de *L. Berland & L. Vergnaud*.

Grava propagandilo por la movado estis la gazeto *Le Travailleur Esperantiste* (La Laborista Esperantisto), kies unua numero eliris januaro 1912. Komence *R. Louis* estis redaktoro kaj administranto, de oktobro 1913 *J. Habert* redaktis kaj *A. Raïmond* administris la gazeton. La enhavo konsistis el propagandaj artikoloj, kroniko, literaturaĵoj, kurso, ktp.

Estas rimarkinda fakto, ke supre nomita gazeto aperis kvazaŭ kiel privata eldonaĵo, ĉar mankis tutlanda organizo unuiganta ĉiujn laboristajn esperanto-grupojn. Nur en la komenco de 1914 la tri diversaj organizoj kuniĝis en unu *Franca Laborista Esperantista Unuiĝo*, restantaj tamen memstaraj kaj sendependaj unu de la aliaj. Ĉi tiu nova unuiĝo eldonis serion da ilustritaj poŝtkartoj kiel reklamilojn por la en 1914 okazonta internacia laborista esperanto-kongreso. Pli da laboro ĝi ne povis fari, ĉar la mondmilito finigis ĝian vivon.

La movado en Francio estis multe malhelpata de la agado de grupeto da idistoj, kiuj faris multan bruon kaj sufiĉe malutilis al nia movado. Pro tio la esperantistoj estis devigataj multe okupi sin pri kontraŭagado. La *Sindikata Esperantista Federacio* eĉ aranĝis grandan publikan kunvenon pri "Esperanto-Ido" kaj eldonis la tie faritajn paroladojn kiel broŝurojn.

Aktivaj laborantoj, ankoraŭ ne nomitaj estis i. a.: *P. Asselin*, *F. Blan Go* (pseudonimo de F. Blangarin) *A. Herman*, *Joffrin*, *A. Panlou* kaj *Senrono*.

Franclingvaj propagandeldonaĵoj el la unuaj jaroj estas:

*E. Chapelier*, *La liberecanoj kaj la lingvo internacia Esperanto*, 1904, Bruselo.

*E. Chapelier & G. Marin*, *La anarkistoj kaj la lingvo internacia Esperanto*, 1907, Paco-Libereco, Parizo.

*C. A. Laisant*, *Esperanto kaj la estonto de la mondo*, 1908, Paco-Libereco, Parizo.

---

\*) Vidu la koncernan ĉapitron.

## EN GERMANIO.

En Germanio fondiĝis en la jaroj 1908—11 laboristaj esperanto-grupoj en Berlino, Dresdeno, Hamburgo kaj aliaj urboj. Jam baldaŭ oni sentis la bezonon pri kunligo laŭ nacia skalo kaj el tio rezultis en 1911 la fondiĝo de la *Germana Laborista Esperantista Asocio (GLEA)*.

Al la naskiĝo de GLEA antaŭiris epizodo, en kiu iu *Leopold Schlaf* komercisto en Dresdeno, ludis strangan rolon. Tiu *Schlaf* "starigis" en 1910 t. n. *Germanan Laboristaran Esperantistan Ligon*. Ĉi tiu organizo ekzistis nur sur papero. Ne okazis kongreso, ne okazis elektoj, ne ekzistis regularo, eĉ mankis plena estraro. Ĝi nur havis prezidanton kaj tiu estis nomita *Schlaf*. En aŭgusto 1910 *Schlaf* komencis eldoni monatan gazeton *Der Arbeiter Esperantist* (La Laborista Esperantisto), oficiala organo de supre nomita "Ligo". Aperis de ĝi 8 numeroj, ĝis marto 1911. La enhavo, kvankam plejparte germanlingva, ne estis tre propagandiga. Estis en ĝi multaj artikoloj kontraŭ Ido, kies adeptoj eĉ per cirkuleroj al la grupoj klopodis konverti ilin al tiu lingvo. En la unua numero de la gazeto troviĝis provizora regularo kaj komuniko, ke en decembro okazos kongreso. En la tria numero ni trovas la adresojn de 30 grupoj. Supozeble inter ili estis ankaŭ ĵus starigitaj kursoj. Tamen estis ankaŭ kelkaj, kiuj estis sufiĉe memstaraj kaj kapablaj kaj ili havis pri organizaj aferoj aliajn ideojn ol la "prezidanto". Ĉi tiu agis tute aŭtokrate; li prokrastis la okazontan kongreson, ne enpresigis proponojn kaj protestojn ktp. Pro tio la grupo en Hamburgo turnis sin per cirkulero al la diversaj grupoj, plendante pri la agado de "prezidanto" kaj konigante al ili siajn proponojn. Responde al tio *Schlaf* eksigis la hamburgan grupon.

Fine en aprilo 1911 en Lajpcigo okazis la kongreso. La unua grava punkto de la tagordo estis la agado kaj konduto de *Schlaf*. Ĉi tiu klopodis pravigi sin, sed ne sukcesis. Montriĝis, ke li agis ne nur nedemokrate, sed ankaŭ profite al sia propra poŝo. Sekve de ĉi ĉio li estis eksigata kaj forigata el la kongresejo. La fino de ĉi tiu malagrabla afero estis proceso kontraŭ GLEA, kiun *Schlaf* akuzis pro ofendo. Ĝi finiĝis per akordo en kiu la kulpo de *Schlaf* estis plene konstatata kaj la ofendintoj reprenis siajn ofendajn vortojn.

Oni devas konfesi, ke *Schlaf* estis bona oratoro kaj propagandisto. Li faris paroladojn en multaj urboj antaŭ granda publiko kaj vekis intereson por esperanto ĉe multaj laboristoj.

Kelkaj grupoj povis post lia parolado komenci kursojn kun 75 kaj eĉ kun 200 partoprenantoj . . . Nur estas bedaŭrinde, ke *Schlaf* tro atentis sian propran monujon.

Fintraktinte la aferon rilate al *Schlaf* la kongreso eklaboris. Oni fiksas la regularon, elektis estraron kaj decidis eldoni monatan gazeton. Estis reprezentitaj 45 grupoj, el kiuj 25 kun ĉ. 600 membroj tuj aliĝis. GLEA rapide kreskis. En 1912 ĝi havis 63 sekciojn kun pli ol 1000 membroj, en 1913 jam 70 kun 1400 membroj. La organo *Antaŭen* aperis regule ĉiumonate, 8-paĝa. Kvankam ĝi de komence portis la adreson de *F. Zuckaroll* kiel redakcejojn, tamen montriĝas el komuniko de la asociestraro en la numero de majo 1912, ke ĝis tiu dato *Oscar Bünemann* redaktis ĝin. La enhavo estis plejparte esperantlingva. Troviĝis en ĝi rakontoj, skizoj, sciencaj artikoloj, grupaj raportoj, ekzerco-rubriko kaj sciigoj de la estraro. Precipe ĝi celis informi kaj pliperfektigi siajn legantojn. Propagandilo por neesperantistoj ĝi ne estis.

Aliaj eldonaĵoj de GLEA estis *Adresareto*, kiu enhavis la adresojn de ĝiaj sekcioj kaj kelkajn el la eksterlando, kaj germanlingva propaganda broŝuro *Der Deutsche Arbeiter und die Welthilfssprache Esperanto* (La germana laboristo kaj la mondhelplingvo esperanto).

Kiel estraranoj de GLEA funkciis ĝis aŭgusto 1914: *F. Hegewald*, *Henneberger*, *A. Mehlhorn*, *A. von Riesen*, *E. Schmiedel*, *A. Schiemeck*, *G. Stein*, *Wegner* kaj *F. Zuckaroll*.

---

## EN HUNGARIO.

Ĉi tie komenciĝis la organizita laborista esperanta movado en 1909, kiam trideko da personoj en aparta ĉambro de trinkejo en Budapeŝto fondis la *Hungarian Esperantistan Societon Laboristan*. Iniciatinto estis *I. Polgar*, aliaj agemuloj estis *J. Haspeklo*, *I. Beller*, *J. Repaszky*, *J. Nagy*, *K. Schreiter* kaj *F. Csikos*. Laŭ la statuto la societo povos ekfunkcii nur, kiam ĉi tiu regularo estos leĝe aprobita. Pro tio nur en 1914 povis fondiĝi la unua grupo en Kassa (nun ĉeĥe: Košice). En majo 1914 la societo partoprenis la tiam ankoraŭ permesitan majan manifestacion kun propra standardo. Jam tiutempe trafis la societon la unua malpermeso: en Szekesfehervar la

polico ne volis permesi grupon motivigante, ke ĝi "ne povas allasi la plimultiĝon de la slangoj" (ŝtelistaj lingvoj). Bone organizita tutmonda protesto sukcesis ŝanĝi ĉi tiun decidon. Laŭ raporto de la komitata kunsido je la 14-a de julio 1914 la societo havis tiutempe ĉ. 400 membrojn . . .

---

## EN JAPANIO.

La unua esperanto-eldonaĵo en Japanio aperis en 1906, kiam ĵurnalisto *Simei Futubatei* publikigis sub la titolo *Legolibro de Mondlingvo* ekzercolibron de d-ro *Zamenhof* kun japana traduko.

Unu jaron poste *E. Osgŭi* (Osugi?) lernis esperanton en la malliberejo. Li donis esperanto-kurson por ĉinaj studentoj en Tokio. Sekve de tio la de ĉinaj anarkistoj eldonita revuo *La Egaleco* (ĉine: Hen-pas) enpresis esperantaĵojn.

En ISR de februaro 1908 aperis artikolo de *E. Osgŭi*. Li skribas i. a.: "...mi trovis vian *Socian Revuon* en la oficejo de Japana Esperantista Asocio. Kiel granda estis mia ĝojo! Mi decidis tuj skribi ion kaj deziris havi honoron kunlaborant-igi." En noto aldonita al la artikolo li komunikas, ke "en Tokio estas kelkaj, kiuj volas lerni esp-on" kaj ke ili "estas organizontaj la Grupon Libertarian Esperantistan".

En la mezo de 1908 aperis ĉina anarkista gazeto *The Chinese Anarchist News*, eldonita de ĉinaj anarkistoj loĝantaj en Tokio. Ĝi ankaŭ enhavis parton da teksto en esperanto. Ni citas el ĝi:

"...ni fine decidis ekstudi la internacian lingvon esperanto. De la komenco de aprilo fondiĝis kurso profesorata de nia japana K-do *Ei Osgŭi*. La kurso okazas trifoje semajne. Nombro da lernantoj estas nun dudek. Ĝi ŝajnas pligrandiĝi ankoraŭ. . ." En la dua numero oni legas: "Nia esperanta entrepreno marŝas tre bone. Multe da studentoj loĝantaj en Japanlando aprobas fervore la lingvon internacian. La kurso pligrandigas ĉiutage la nombron da lernantoj, kiuj progresas rapidege. . .")

En 1911 *Sato Osuka* kaj *T. Jamaga* lernis esperanton kaj per tio interrilatis kun alilandaj. En 1913 *Jamaga* vojaĝis Ĉinion kaj poste helpis en ŝanĝaĵo ĉe la eldono de "*La voĉo de la popolo*".

---

\*) ISR julio 1908.

En oktobro 1914 aperis en Tokio japanlingva gazeto *La Proletario* (*Proletaria ĵurnalo?*), eldonita de E. Osgi. Sed jam ĝia unua numero estis konfiskata de la polico. Laŭ mencio en *La voĉo de la popolo* kies redakcio per sekreta forsendo ricevis ĉi tiun numeron, ĝi ankaŭ enhavis tekston en esperanto.

---

## EN NEDERLANDO.

La unua propagandisto por esperanto inter la nederlandaj laboristoj estis J. L. Bruijn en Hago. Li publikigis en la aŭtuno de 1906 en la *Volksdagblad* (Popola Tagĵurnalo) esperantokurson en 10 lecionoj. En notoj aldonitaj al ĉi tiuj lecionoj li raportis pri la esperanto-movado, pri *Internacia Socia Revuo* ktp.

Unu jaron poste, en majo 1907, fondiĝis en Hago la *Ĝenerala Esperanta Laborista Klubo* kaj en Amsterdamo la *Laborista Societo Esperantista*. Ambaŭ grupoj estis neŭtralaj, ne havis socialistan tendencon.

La haga grupo komencis en julio 1908 la eldonadon de monata gazeteto *Frateco*, redaktata de J. L. Bruijn. Ĝi estis, same kiel la grupo, neŭtrala. La redakcio diris en sia Antaŭ-parolo:

Jen modesta folieto difinita por veki la intereson de l'laboristoj por la tutmonda helplingvo esperanto... Precipe la laboristaro ja povas atendi nekalkuleble multe da utilo de l'aplikado de esperanto, ĉar ĉi tiu estas fortika rimedo en la batalado por plialta, plibona socio ... Estas preskaŭ superflue diri, ke la enhavo de nia organo estos ĝenerala kaj neŭtrala. Ni deziras grupigi ĉiujn laboristojn, kiaj ajn estu iliaj politikaj konvinkoj, ĉirkaŭ la verda standardo.

La plimulto el la enhavo estis dulingva: en nederlanda lingvo kaj esperanto. Krom propagandartikoloj troviĝis en ĝi ankaŭ kelkfoje leteroj de alilandaj korespondantoj pri laboristaj temoj. Menciinde estas, ke laŭ artikolo en iu numero de *Frateco*, tiama revolucia socialdemokrato, W. van Ravensteyn, nomis la propagandon por esperanto inter la laboristoj "danĝera ludeto" kaj la esperanto-movadon "burĝa malsaĝaĵo".

Kuriozaĵo estas la fakto, ke la redaktoro de *Frateco* estis socialisto, la administranto... katoliko!

*Frateco* ne vivis longe; en majo 1909 eliris ĝia lasta numero.

Sed jam en septembro 1910 la *Generala Esperanta Laborista Klubo* aperigis novan gazeton *Laborista Esperantisto*. Redaktadon kaj administradon prizorgis *R. Coomans*. Ĉi tiu gazeteto, kvankam ankaŭ neŭtrala, estis malpli ĝenerala, pli distinge laborista ol ĝia antaŭulo. Ĝi enhavis propagandartikolojn en nederlanda lingvo kaj rakontojn kaj skizojn en esperanto. Ĝia lasta numero eliris en aŭgusto 1911.

En majo 1911 fondiĝis la *Nederlanda Federacio de Laboristaj Esperantistoj*. Ĝi konsistis el nur du sekcioj, nome Hago kaj Amsterdamo. Kvankam ĝia anaro estis plejparte socialista, ĝi tamen akceptis neŭtralan starpunkton. Sekretario estis *K. H. Meyer* en Hago, prezidanto *W. Nutters* en Amsterdamo.

En septembro 1912 la Federacio ekeldonis monatan propagandan gazeton *Arbeider Esperantist* (Laborista Esperantisto). *W. Nutters* estis redaktoro, la administradon prizorgis *K. H. Meyer*. Lastnomito poste ankaŭ redaktis la gazeton.

Laŭ statistiko la Federacio havis en komenco de 1913 ok sekciojn kun sume ĉirkaŭ 200 membroj.

Al la en Frankfurto okazinta kongreso de *Germana Laborista Esperantista Asocio* (1913), kie estis preparolata la temo "Internacia organizo de laboristaj esperantistoj" ĝi sendis delegiton, kiu defendis tie la starpunkton, ke en fondota Internacio devas esti loko por ĉiu laborista esperantisto.

En *Arbeider Esperantist* de majo 1914 (speciala propaganda numero) estis presitaj eldiroj pri esperanto de kelkaj gvidantoj de la laborista movado nederlanda. Ĝi enhavis i. a. favorajn vortojn de *F. Domela Nieuwenhuis* kaj *N. J. C. Schermerhorn*. Socialdemokrataj gvidantoj ĝenerale ne favoris la esperantan movadon.

*J. L. Bruijn* tradukis kaj eldonis en 1909 *Naŭ historioj pri la aŭtoritato laŭ Multatuli*. Poste li transiris en la neŭtrala movado. *W. Nutters* publikigis en 1912 en *Het Volk* (La Popolo), ĉeforgano de la *Socialdemokrata Laborista Partio*, esperantokurson. Li verkis lernolibron kaj bonegajn propagandartikolojn.

## EN RUSIO.

Esperanto naskiĝis en Rusio; ĝia unua lernolibro aperis en la rusa lingvo (1887). Sed ĝuste en Rusio la esperanto-movado, eĉ la neŭtrala (ĉar *laborista* esperanta movado pro politikaj cirkonstancoj ne povis ekzisti tie antaŭ 1917), suferis pro multaj malhelpoj flanke de la registaro.

En 1895 aperis en la gazeto *La Esperantisto* artikolo titolita "Prudento aŭ kredo?", de la konata verkisto *Leo Tolstoj*. Pro ĉi tiu artikolo la eniro de la nomita gazeto en Rusio estis malpermesata.

Komence tute ne estis eble en Rusio eldoni gazeton aŭ aliajn publikaĵojn en esperanto, ĉar mankis speciala esperanto-cenzuristo. Vane dum 17 jaroj rusaj esperantistoj en diversaj lokoj klopodis ricevi permeson por eldoni gazeton. Nur en januaro 1905 povis aperi la unua numero de *Esperanto*, gazeto por propagando de la internacia lingvo esperanto en Rusio. Sed eĉ poste esperantistoj, kiuj estis aktivaj en multaj lokoj, ne povis akiri permeson por eldono de esperantaĵoj. Ankoraŭ en 1907 moskvaj esperantistoj petintaj permeson por aperigi esperanto-gazeton ricevis malaprobajn respondojn.

Ĝis 1905 ekzistis en Rusio unu esperanto-societo en St. Petersburgo, kiu havis filiojn en 13 diversaj urboj.

En 1905 aperis la gazeto *Ruslanda Esperantisto*, kiu vivis ĝis 1907 kaj poste reaperis de 1909 ĝis 1910. Gazeto *Espero* eliris dum la jaro 1908.

En 1908, en Serpuĥov laŭ iniciato de la loka esp. societo estis malfermataj kursoj en Popola Domo de l'grafino Sollogub, sed kiam la grafino eksciis pri tio, ŝi tuj postulis likvidi la kursojn, ĉar ŝi konsideris esperanton lingvo de "diablaj framasonoj".

En 1909 fondiĝis *Ruslanda Ligo Esperantista* laŭ iniciato de gazeto *Ruslanda Esperantisto*, kie ludis ĉefan rolon kolonelo *Postnikov*. Samjare aperis en Moskvo nova organo *Ondo de Esperanto*, kiu iĝis la centro de la rusa esperanta movado.

En aprilo 1911 okazis en Petersburgo polica traserĉado en la loĝejoj de kelkaj esperantistoj kaj en la oficejo de la *Ruslanda Ligo Esperantista*. Ĉiuj trovitaj korespondaĵoj, fotoj kaj gazetoj estis forprenataj. Kelkaj esperantistoj estis arestataj. \*) Inter ili estis la prezidanto de la *Ruslanda Ligo*

---

\*) *La Ondo de Esperanto*, n-o 6, junio 1911.



*Esperantista, Postnikov*, kiun oni kondamnis pro "ŝtatperfid".\*) La Ligo estis malstarigata.

Komence de 1913, moskvaj esperantistoj klopodis aranĝi esperanto-kongreson, sed la administraj organoj ne donis permeson por tio.

En Vladivostoko al kunveno de esperantistoj polica oficiro alportis malpermeson paroli publike pri esperanto.\*\*)

Okazis, ke la cenzuro el la medicina revuo *Voĉo de Kuracistoj* elprenis unu paĝon pro iu suspekta artikolo de doktoro.

Kiam al kievaj esperantistoj estis donita la permeso kunvoki Tutruslandan Kongreson, direktoro de polica departemento skribis: "Necesas, ke estu organizita de la loka administracio severa observo dum la kunsidoj de ĉi tiu kongreso."

Estas kompreneble, ke en tiaj cirkonstancoj laborista esperanta movado ne povis ekkreski. Sed tamen troviĝis laboristoj kaj intelektuloj, kiuj komprenis la gravon de esperanto kaj klopodis lerni ĝin. Pri tio atestas jenaj faktoj:

En 1906 senlaboruloj okupitaj en societaj laboroj en Peterburgo sendis delegiton al la esperanto-societo *Espero* kun la peto doni al ili lecionaron por instruado en esperanto.

En Harbin organiziĝis en 1910 malgranda grupo el laboristaj esperantistoj ĉe la ĉefaj fervojaj metiejoj.

En Vladivostoka malliberejo en 1909 laboris sub gvido de *Frolov* inter politikaj malliberuloj esperanto-rondeto.

En Orel la Gubernia Ĝendarma Oficejo notas, ke la membroj de loka grupo de la *Rusa Social-Demokrata Laborista Partio*, zorgas pri kreo de esperanto-rondeto.

En Samara Gubernio laboristoj de kolorigista korporacio petis per la vilaĝano *V. Kodakov* al la guberniestro permeson kunvoki personojn, kiuj volis studi esperanton kaj organizi societon. La guberniestro respondis, ke "studado de esperanto estas afero de lernejo, sed ne socia afero".

En 1910, en *La Ondo de Esperanto* skribas d-ro *Kogan*, provinca kuracisto: "... en unu bela dimanĉo venas piedire du nekonataj laboristoj en porcelanfabriko, kiu troviĝas je 15 verstoj de mia loĝloko. Ili aŭdis en la urbo Dmitrovo pri mi kiel esperantisto kaj venas nun kun la humila peto instrui ilin pri esperanto."

---

\*) "La transdonis diversajn sekretajn dokumentojn pri artilerio kaj multaj fortikaĵoj al militaj agentoj aŭstria, japana, germana". *La Ondo de Esperanto*, n-o 12, 1911.

\*\*) *Ruslanda Esp-isto*, n-o 8, 1906.

Ĉi tiuj faktoj montras, ke intereso por esperanto ne mankis. *Internacia Socia Revuo*, la internacia proleta esperanto-organò, havis en 1912 en Rusio ĉ. 20 abonantojn kaj diversajn kunlaborantojn. Bedaŭrinde ne estas eble ekscii, kiuj estis ĉi lastaj, ĉar ĉiuj artikoloj pri Rusio estis subskribitaj per pseŭdonimoj kiel: *Timemulo*, *Amiko*, *Malnova rusa esperantisto*, *Tomo*, *Danielo*, *Boriso* k. s. Sed ankaŭ la disvastiĝo de ĉi tiu revuo en Rusio renkontis malfacilaĵojn. Librejo, kiu vendis ISR-on, skribas al ties eldonanto: "Ni ne plu povas vendi vian feruon, ĉar la estraroj malpermesis tion kaj oni riskas fermiĝon de la librejo."

La polico ne malatentis la agadon de la esperantistoj. En 1912 la cara "oĥranka" (sekreta fako) per speciala cirkulero de 10. aŭgusto (n-o 04953) proponis tre atente observi la esperantistojn havantajn kunligon kun ISR kaj *Liberiga Stelo*. Ĝi eĉ havis specialajn agentojn por observi la esperantistojn. Pri tio certigas raporto de Ĝendarmestro de Moskva-Arĥangelska Fervojo de 27 septembro 1912 (n-o 744), per kiu kolonelo *Kasatkin* informas la departementon de polico pri la valora agado de iu *Tatarenkov*, kiu montris al li personojn aktive propagandantajn esperanton laŭ programo de *Liberiga Stelo*. La kolonelo proponas pagi al T. ĉiumonatan salajron, ĉar "por la granda kvanto da informoj, kiujn donas T., li konsideras malprofite pagi al li laŭ ekzemplero". Eĉ oficialaj diplomatoj okupis sin pri la kolektado de informoj en eksterlando. En la dokumentoj de la polica departemento de 1912 oni trovas informon de oficisto por specialaj komisioj en Parizo, pri kolektado de informoj pri revolucia agado de esperanta organizo *Liberiga Stelo* aŭ, kiel ĝi nomiĝas en la dokumentoj de la "oĥranka", "*Stelo-Libero*".

---

## EN SVEDIO.

Pri la movado en Svedio ne estas multo konata. Jam en 1901 la kongreso de la *Ligo de junaj socialistoj* akceptis proponon favoran al esperanto kaj decidis dediĉi unu kolonon da teksto en sia organo *Brand* al esperanto. Sed ĉu ĉi tiu decido efektiviĝis?

Laŭdire ekzistis en 1903 en Stokholmo *Klubo Esperantista de laboristoj*. Ŝajne ĝi poste malfondiĝis. Tamen en 1907 ĝi

ankoraŭ ekzistis kaj eĉ vigle agadis. Ĝi havis propran ĉambron kaj aranĝis multajn kursojn. Sekretario estis tiam *Hj. Wallberg*.

Tre fervora laboranto por nia ideo estis tiutempe *E. Hakanson* en Södertelge. Li propagandis en gazetoj kaj ĉe kongresoj kaj estis krome aktiva kunlaboranto al ISR. Tro frue, estante 24-jara, li mortis en la aŭtuno de 1907.

En 1905 fondiĝis en Stokholmo *Laborista Esperanto-klubo de anarkistoj*. En 1912 laŭ iniciato de *John Johansson* stariĝis en la sama urbo *Laborista Esperanto-klubo*. En Gotenburgo fondiĝis grupo en 1909.

---

## EN ALIAJ LANDOJ.

Kvankam kelkaj landoj ne estas reprezentitaj en ĉi tiu skizetaro, tio ne signifas, ke en nenomitaj landoj ne estis laborantoj por nia ideo. Ni ne parolis pri Aŭstrio, kvankam en Vieno funkciis aktiva laborista esperanta grupo, ni ankaŭ ne nomis Bulgarion, Hispanion, Portugalion, Rumanion k. a., kvankam *Internacia Socia Revuo* tie havis aktivajn kunlaborantojn, kiuj sendube ankaŭ laboris por la disvastigo de esperanto inter la laboristoj. Sed pro manko de informoj ni ne povis raporti pri ilia agado.

Ĉi loke, kvankam kronologie ekster la kadro de ĉi tiu verketo, ni ankoraŭ menciis la gazetojn *Socialismo*, eldonita de hispanaj kamaradoj en Madrido en aŭgusto-septembro 1914 kaj *Liberiga Stelo*, eldonita en 1916 en Buenos Aires. De ambaŭ eliris, laŭ nia scio, nur du numeroj.

---

## INTERNACIA ORGANIZADO.

La unua internacia proleta esperanta organizo estis la *Internacia Asocio "Paco-Libereco"*. Ĝi fondiĝis en majo 1906 en Parizo. Iniciatintoj estis *Fi-Blan-Go* kaj *R. Louis*, kiuj en la unuaj jaroj ankaŭ estis ĝiaj ĉefaj gvidantoj. Ceteraj membroj de la estraro estis *G. Bastide*, *E. Hakanson*, *C. Papillon* kaj *P. Soler*.

La celo de la asocio estis, laŭ artikolo unua de la statuto:

Batali per presaĵoj (libroj, broŝuroj, revuoj, prospektoj, ktp.) kontraŭ la Armeo kaj la Militarismo, la Kapitalismo, la Alkohol-

ismo, fine kontraŭ ĉiuj dogmoj kaj antaŭjuĝoj, por la plibonigo de la socia vivado.

Disvastigi la lingvon internacian "esperanto" ĉe ĉiuj internacianoj, liberpensuloj, socialistoj, liberecanoj, ĉu organizante kursojn, ĉu alimaniere.

Propagandi la kontraŭmilitarismajn, socialismajn kaj liberecanajn ideojn ĉe la esperantistoj.

*Paco-Libereco* estis sufiĉe aktiva. En kelkaj jaroj ĝi aperigis kvin esp.-lingvajn libretojn kaj du propagandobroŝurojn franclingvajn. Ĉi tiuj libretoj havis kontraŭmilitisman tendencon. Ĝi ankaŭ aranĝis kursojn, precipe en Francio.

En 1910 *Paco-Libereco* kuniĝis kun alia esperanta organizo: *Esperantista Laboristaro*. Pri ekzisto kaj agado de ĉi lasta organizo informoj ne estas troveblaj. Kaŭze de ĉi tiu kuniĝo la nomo de la nova societo iĝis *Liberiga Stelo*. Ankaŭ la statuto iom ŝanĝiĝis. En la nova statuto oni i. a. ne plu parolis pri batalo kontraŭ la alkoholismo, sed kontraŭ la religio. "Batali por plibonigo de la socia vivado" cedis lokon al "batali por la malstarigo de la kapitalista socio". "Propagandi kontraŭmilitismajn, socialistajn kaj liberecanajn ideojn" estis anstataŭigata per "propagandi liberigajn ideojn". Estis aldonate al la celoj "helpi al neesperantistaj lab.-organizaĵoj". Krome la nova statuto ebligis ankaŭ al neesperantistoj aliĝi al la asocio, se ili aprobas ĝian programon.

Oni ne povas diri, ke la kuniĝo de ambaŭ organizoj multe utilis. Estas neniu atesto pri plia aktiveco de *Liberiga Stelo*. Ŝajne ĝi eĉ malpliaktiviĝis. Broŝuroj, kiaj aperis en la unuaj jaroj, ne plu eliris. La membronombro restis proksimume la sama.

Oni devas konstati, ke la organizo, ĉu sub la nomo *Paco-Libereco*, ĉu kiel *Liberiga Stelo*, malgraŭ la agemo de siaj gvidantoj ne sukcesis esti vera, bone funkcia internacia organizo. Ekster Francio, kie loĝis la plimulto el ĝia membraro, ĝi havis kelkajn membrojn en deko da diversaj landoj. Ŝajnas, ke precipe en tiuj landoj, kie la anarkista tendenco estis iom forta, ĝi trovis simpatian ĉe la laboristaj esperantistoj. En Germanio, kie tiutempe la laborista esperanta movado estis pli forta ol en aliaj landoj, ĝi havis tre malmulte da membroj. En Nederlando, kie la neŭtralisma tendenco superregis, ĝi eĉ ne trovis unu membron. Ankaŭ Britio, kie ĉe multaj socialistoj oni trovas iom da religiemo, ne povis esti favora kampo por asocio, kiu celas kontraŭbatali la religion.

Malavantaĝo estis, ke la asocio ne havis propran organon. Estas vere, ke ISR ne rifuzis enpresigi komunikaĵojn ktp. pri ĝi, ĉar en la unuaj jaroj la gvidantoj de *Paco-Libereco* kaj la

redaktoro kaj administranto de ISR estis la samaj personoj. Sed propra gazeto, interliganta ĉiujn membrojn, propagandanta la ideojn de la asocio ja estus farinta grandajn servojn al ĝi.

Oni ankaŭ povus demandi, ĉu *Liberiga Stelo* ne antaŭmetis al si tro grandajn, tro ampleksajn taskojn. Batali kontraŭ la militismo, kontraŭ la religioj, kontraŭ ĉiuj dogmoj, tio estas sendube grandega tasko. Tro ampleksa estis la celaro de *Liberiga Stelo*, ne tia, ke ĉiuj aŭ almenaŭ la pli granda parto de la laboristaj esperantistoj povis kolektiĝi sub ĝia standardo. Aliflanke grandega parto de laborista esperantistaro pensis nur pri propagando kaj ne atentis la uzadon de la lingvo. Kaj krome ankaŭ la neŭtralismo ankoraŭ regis en la tiutempa movado. Nur per ĉi tio estas klarigebla la fakto, ke kvankam la laborista esperanta movado nombris almenaŭ 2 milojn da adeptoj, la anaro de *Liberiga Stelo* estis nur kelkaj centoj.

Per la ekzisto de *Liberiga Stelo* la organiza problemo do ne estis solvita. La plimulto el la laboristaj esperantistoj ne aprobis ĝian tendencon. Pro tio ĉi tiu asocio ne sukcesis igi sin la efektiva reprezentanto de la laborista esperantistaro kaj la organiza problemo restis aktuala kaj diskutata demando.

En la ruĝulaj kunvenoj ĉe la universalaj kongresoj, en la jarkunvenoj de la landaj asocioj kaj en la diversaj organoj laboristesperantistaj la organiza demando estis multe preparolata temo, precipe en la jaroj 1912—1914. Ĉe la kongreso de la *Germana Laborista Esperanta Asocio* okazinta dum pasko 1913 en Frankfurto okazis preparoloj pri tio, kiujn ĉeestis ankaŭ delegitoj de la nederlanda kaj franca laboristaj esperantoorganizoj kaj kamaradoj el Rusio, Bohemio kaj Hispanio sen mandatoj.

A. von Riesen el Hamburgo enkondukis la temon kaj konkludis, ke estas eble fondi tutmondan organizon, al kiu povos aliĝi pro praktikaj kaŭzoj nur po unu organizo el la diversaj ekzistantaj regnoj; diversaj tendencoj rilate al politika, sindikata aŭ lingvaj bazoj sin devus unuigi en unu asocio de la koncerna regno.

La sekvintaj parolantoj principe konsentis al tiuj proponoj kaj oni komisiis la estraron de GLEA interrilati kun eksterlandaj asocioj, por ke ĉe la kongreso en Parizo (1914) oni definitive decidu pri tiu afero kaj starigu tutmondan organizon.

Aperis diversaj projektoj de statuto por internacia organizo. La plej konata — kaj ŝajne ankaŭ la plej aprokata — estis tiu de la GLEA-estraro. Por konigi ĝin ni citu ĝian plej gravan parton:\*

#### Nomo

La diverslandaj laboristaj esperantistaj unuiĝoj kunligas sin kaj alprenas por tiu centra unuiĝo la nomon: *Internacia Laborista Esperantista Asocio*.

#### Celo

La ĉefaj taskoj de tiu unuiĝo estas:

a) Krei daŭran kaj firman kunligon inter la jam ekzistantaj regnaj unuiĝoj kaj illa geanaro.

b) Subteni la propagandon por la disvastigado de la mondhelplingvo *esperanto* en la popolamaso ĉiulanda tia, kia ĝi estas difinita en la fundamento de d-ro Zamenhof, kaj laŭ la principoj, kiujn starigas la instancoj, kreataj por plua disvolviĝo, se tiuj korporacioj estas destinitaj de la tuta esperantistaro kaj se ili estas bazitaj je demokrata elektraĵo kun la fincelo, ke tiu ĉi lingvo fariĝu la dua de ĉiu homo kaj la sola lingvo por intergentaj pritraktadoj.

c) Reprezenti nian movadon ĉe okazontaj kongresoj naciaj kaj internaciaj de laboristunuiĝoj, pruvante tie ĝian facilan ellerneblecon kaj praktikan taŭgecon por la kongresoj de la diverslingvaj kunvenantaroj.

d) Rilate al nacieco, politiko, religio kaj ĉiuj ajn personaj konvinkoj, la ILEA rezervas neŭtralan karakteron.

En la artikolo pri aliĝo estis dirate, ke povas aliĝi ĉiulandaj laboristaj esperantistaj unuiĝoj, kies ĉefa tasko estas la propagando de esperanto kaj ke aliĝo de nove fondita laborista esperanta unuiĝo el lando, kie jam ekzistas neŭtrala tia unuiĝo, nur estos permesata, se tiu aparta novfondiĝo estas rajte pruvata per la neceso pri propagando de esperanto inter samprincipanoj.

Karakteriza trajto en ĉi tiu projekto estas, ke en ĝi tute ne estis parolata pri uzado kaj utiligo de esperanto, pri eldono de organo, nek pri klasbatalo, aŭ klasa starpunkto. Rilate al nacieco, politiko kaj religio ĝi estis neŭtrala. Kaj tamen la proponinto, GLEA, staris sur klasbatala starpunkto!

Tute alian projekton faris la *Bohema Laborista Asocio Esperantista*. Ĝi proponis kuniĝon de naciaj asocioj en *Internacia Laborista Federacio Esperantista* (ILFE).

Membro de ILFE povas fariĝi nur tiu asocio, kiu staras sur bazo de klasa batalo; kiu propagandas internacian lingvon, por prepari per ĝia helpo la vojon por sociala revolucio; kaj fine tiu, kiu en demandoj pure esperanto-lingvaj respektas la principon de *natura demokrata evoluado* de l' mondlingvo.

\* Ni ne ŝanĝis la lingvaĵon de la originalo.

La tasko de laboristaj esperantistoj estas propagandi la Zamenhof-an mondolingvon en vicoj de klase organizita laboristaro de ĉiuj nacioj, prepari ĝian aprobon kiel internacian lingvon de monda klasa movado laborista, praktike faciligadi internaciajn rilatojn de laboristoj, eldonadi unuecan porinforman socialistan mondliteraturon kaj krei internacian proletarian esperantan gazetaron.

Tiamaniere devas esti praktike plifortigita internacia solidareco kaj klasa unueco de proletariaro, plialtigita ĝia ĝenerala batalkapablo sur monda forumo kaj tiel preparotaj la fundamentoj por estinta kulturo mondcivitana.

Monda organizaĵo laborist-esperantista kunigas ĉiujn klase organizitajn samcelanojn de ĉiuj nacioj kaj de ĉiuj praktike diferencigantaj skoloj (direktoj) kolektivistaj. Ĝi bazas sur jenaj du principoj:

a) sur principo de absolute libera aŭtonomio de laboristoj de ĉiu nacio resp. *lingvo*;

b) sur principo de absolute libera aŭtonomio de ĉiu praktike memstara socialista skolo (direkto).

Laŭ ĉi tiu projekto povus aliĝi al la internacia organizo ankaŭ du samlandaj asocioj diverstendencaj. En la enkonduko estis dirate i. a.:

Ni akcentas, ke estonta ILFE devas alcentrigi ĉiujn klase ideantajn laboristojn, ili estu socialdemokratoj aŭ anarhistoj. Memkompreneble estas tre malfacile trovi por tia larĝa bazo bonan esprimon, sekve ni parolas en projekto pri kolektivismo aŭ pri socialismo kiel eble plej ĝenerale. La celo de la Federacio lastavice estas, plifaciligi kaj pliakrigi la reciprokan intersanĝon de pensoj de diversaj skoloj klaslaboristaj: tial nia projekto bazas sur absoluta, netuŝebla aŭtonomio de ĉiu ajn skolo, nacio, asocio.

Ĉi tiuj citaĵoj montras grandan diferencon inter la starpunktoj de la germanaj kaj la bohemaj kamaradoj. La ideoj de ĉi lastaj montras ian parencecon al tiuj de la postmilita movado. Klas-batala starpunkto, utiligo de esperanto por laborist-klasaj celoj, celado al plifortigo de internacia solidaro kaj al kreado de kulturo mondcivitana — ĉi ĉion ja ankaŭ celas kaj subtenas granda parto de la nuntempa laborista esperantistaro.

---

## INTERNACIA SOCIA REVUO.

Proksimume en la jaroj 1905—06 ekaperis ĉe kelkaj diverslandaj laboristaj esperantistoj la ideo eldoni internacian esperantan gazeton por ruĝuloj. Precipe *M. Verema* (pseŭdonimo de *P. Berthelot*) en Svisio, *V. Richard* kaj *R. Louis* en Francio, *E. Chapelier* en Belgio, *E. Hakanson* en Svedio kaj *Zoltan Baranyai* en Hungario okupis sin pri tio kaj interrilatis

unu kun la alia. Sekve de tio *M. Verema* en Genevo aperigis en 1906 *Rondirantan Folieton* por kreado de tutmonda *SOCIA REVUO* pri ĉio, kio interesas la homaran vivadon. Eliris de ĝi 4 numeroj (kune 24 paĝoj), el kiuj tri estis prizorgitaj de *Verema*; la lastan numeron redaktis *Fi-Blan-Go* en Parizo.

Ĉi tiu Folio enhavis i. a.: alvokojn "Al la socialistoj" de *V. Richard*, "Al la Anarhistoj" de *E. Chapelier*, artikolon "Niaj planoj kaj projektoj" de *M. Verema* kaj aliajn pri *Paco-Libereco*, pri pacismo kaj socialismo, pri programo, pri titolo, pri la kunveno de esperantistaj ruĝuloj en Genevo ktp. En la kvara numero troviĝis *Fundamenta Deklaracio* tekstanta jene:

La kunveneto, kiu okazis ĉe la "Cercle Communiste", en Genevo, la 2-an de septembro 1906, kunveneto, kie ĉeestis diverslandaj esperantistoj socialistaj aŭ liberecanaj, decidis fondi tiun ĉi revuon, esperante redaktatan, kiel internacian organon por defendi la liberigajn ideojn. La titolo alprenata por la gazeto estas: *Internacia Socia Revuo*.

La redaktantoj deklaras, ke tiu ĉi gazeto estos:

1-e. *Rimedo* por interkunigi la socialistojn kaj liberecanojn-esperantistojn diverslandajn per intersaĝo de ideoj teoriaj kaj praktikaj.

2-e. *Informa folio* rilate al internacia socia movado, ĉu politika, ĉu ekonomia.

3-e. *Organo batalema* starigata kontraŭ ĉiuj potencaĵoj, kiuj subpremas la homan rason, kaj permesas la ekspluatadon de homoj per homoj.

Petas nur la helpon, por enkonduki ilian aferon de la ruĝuloj sen distingeco de titoloj: socialistoj, anarkiistoj, liberecanoj, liberpensantoj, ktp.

Alprenas, ke la gazeto akceptos la teoriajn disputojn, tamen en la limo de la loko disponebla, kaj observigas ke la parto *disputada* estas morale akceptata kiel malpli urĝa ol la parto *informada*.

Petas ĉiujn kamaradojn, ke ili diskonigu per propagando tiun ĉi jurnaleton, liberegan tribunon por la defendo de la homaj rajtoj.

Kaj fine ekvekgas ĉiujn liberajn konsciencojn per la alvoko: Socialistaj kaj liberecanaj esperantistoj ekstaru! Agadi estas vivi! Antaŭen por la libereco!

Ĉi tiu deklaro estis subskribita de *V. Richard*, *P. Berthelot*, *Fi-Blan-Go*, *R. Louis* kaj *C. Papillon*.

Komence de 1907 aperis la unua numero de *Internacia Socia Revuo* kun subtitolo "monata esperanta gazeto, internacie redaktata kaj ilustrata pri ĉio, kio interesas la homaran vivadon". Ĝi estis 16-paĝa, plus verda kovrilo, formato 27×21,5 cm. La kovrila titolpaĝo estis ilustrita de desegnisto Willette; ĝi prezentis bildon de virino sidanta supre sur terglobo kaj mamnutranta kvar malsamajn rasojn.



La enhavo estis:\*) *Generalaj artikoloj*: La vilaĝanaj agristoj en Rusujo, de *amiko*; La feliĉo por la proletarioj, de *J. Nys*; Pripensadoj pri la individualismo, de *M. Devaldes*; Kontraŭ la rusa prunto, de Internacia Socialista Oficejo; *Sociaj kaj politikaj partioj ĉiulandaj*: Socialistaj Partioj en Granda Britujo de *W. W. Padfield*; Sveda laborista movado, de *E. Hakanson*; *Socia Movado*: informoj el kaj pri Bohemlando, Bulgarlando, Brazillando, Franclando, Germanlando, Gvineo, Holando, Hispanlando, Meksiklando, Ruslando, Svislando, Unuigitaj Statoj; *Esperanta Movado*: diversaj sciigoj. Sur la kovrilo ni trovas komunikaĵojn: Al niaj legantoj, Al niaj kunlaborantoj, nomoj de kunlaborantoj kaj desegnistoj ktp. Ankaŭ tutaĵa bildo (desegnaĵo) estis en ĝi.

En la unua jaro eliris 11 numeroj (9 kajeroj), sume 152 paĝoj. Sed ĉar la nombro da abonantoj ne estis sufiĉe granda, en la lasta parto de la jaro la kaso estis malplena kaj por aperigi la lastajn numerojn de la jarkolekto, oni devis alvoki la oferemon de la abonantoj. Ankaŭ en la postaj jaroj ripetigis ĉi tiu malfacilaĵo. En 1908 oni klopodis venki ĝin farante el ISR malmultekostan, duonmonatan gazeton (kelkaj eĉ proponis ĝin eldoni semajne!), sed sensukcese. En julio kaj aŭgusto efektive aperis ISR duonmonate, sed en la lastaj kvar monatoj eliris nur po unu kajero okpaĝa. La provo do plene fiaskis. La tuta jarkolekto 1908 nombris 144 paĝojn. Ekde junio tiujare la kovrilo estis forlasita. La tria jarkolekto konsistis el 12 kajeretoj okpaĝaj.

Dum ĉi tiuj unuaj tri jaroj la revuo aperis en Parizo, redaktata de *Fi-Blan-Go* kaj administrata de *R. Louis*. La enhavo estis pli malpli simila al tiu de la unua numero. Laŭ nia nuna koncepto ĝi enhavis tro da longaj teoriaj artikoloj.

La jarkolektoj 1910 kaj 1911 ampleksantaj respektive 104 kaj 100 paĝojn, estis redaktataj de *J. L. Bruijn* en Hago. La enhavo restis proksimume la sama; ĝi iĝis iom pli diversspeca kaj ankaŭ aperis en ĝi kelkfoje literaturaĵoj.

En siaj tri lastaj vivjaroj ISR estis prizorgata de *W. Nutters* en Amsterdamo. Iom post iom la stato de la revuo iĝis pli sana. La abonantaro kreskis. En la komenco de 1912 ĝi havis preskaŭ 300 abonantojn en 22 landoj, en la mezo de tiu jaro 400 en 16 landoj, en 1913—1914 eĉ pli ol 600. De 1913 la revuo havis formaton kiel libro, 21 × 13,5 cm. Ĉiu numero estis 24-paĝa, la tuta jarkolekto de 1913 ampleksis 312 paĝojn.

---

\*) Ni ne ŝanĝis la lingvaĵon de la originalo.

Ankaŭ la enhavo pliboniĝis. Malpliĝis la ĝeneralaj artikoloj, plimultiĝis informoj pri vivo kaj batalo de la laboristaro. Aperis ankaŭ bonaj literaturaĵoj.

Je la fino de 1912 la abonantaro estis dividita jene: Germanio 231, Britio 104, Francio 80, Aŭstrio 53, Nederlando 51, Hispanio 41, Rusio 20, Bulgario 14 (?), Hungario 14, Usono 10, Aŭstralio 6, Ĉinio 2, Japanio 2, Rumanio 2, Svedio 2, Brazilio 1, Turkio 1, Manĝurio 1. Oni vidas, ke tute mankas la landoj Argentino, Belgio, Danio, Grekio, Italio, Norvegio, Polio, Portugalio kaj Svisio.

Plej grandaj nombroj da abonantoj estis en Parizo (ĉ. 40), Lajpcigo (36), Amsterdamo (23), Vieno (21), Hamburgo (20), Munĥeno (18), Frankfurto (17), Stutgarto (17), Bilbao (16), kaj Prago (15).

La plej regulaj kunlaborantoj al ISR estis: en Aŭstrio: *R. Auerbach* kaj *Cnarf*, en Belgio: *E. Chapellier*, en Britio: *J. Hoyle*, *H. Hyams* kaj *W. Padfield*, en Bulgario: *I. Nenov*, en Francio: *Fi-Blan-Go*, *R. Louis*, *C. Papillon* kaj *A. Panlou*, en Germanio: *D. Ivanski* kaj *W. Thielking*, en Hispanio: *C. Froment*, en Hungario: *J. Toth*, en Italio: *Luigi Berta*, en Meksikio: *Genurare E. Terrues* kaj *Renato Rugters*, en Nederlando: *J. L. Bruijn*, *R. Coomans* kaj *W. Nutters*, en Nov-Zelando: *E. H. Parker*, en Portugalio: *E. Costa*, *Carlo Nobre* kaj *Gomes Pereira*, en Rumanio: *E. J. Nicolev*, en Svedio: *E. Hakanson*, *J. Johanson* kaj *Valberg*, en Usono: *Perlov*, *D. A. Klagin* kaj *C. E. Randall*. De la rusaj kunlaborantoj ni scias nur la pseudonimojn.

La militeksplodo subite finis la vivon de ISR. La numero de aŭgusto 1914, jam presita, ne plu povis esti ekspedata. Kelkajn monatojn poste, en decembro samjara la redaktoro ankoraŭ aperigis 8-paĝan militnumeron, sed ankaŭ ĝi atingis nur kelkajn abonantojn. La cenzuro malebligis, ke ĝi trafu en la manojn de la adresitoj. Kiel multaj aliaj entreprenoj, ISR likvidiĝis kiel viktimo de la milito. \*)

---

## INTERNACIAJ KUNVENOJ.

La Universalajn Kongresojn de Esperanto ĉeestis kutime ankaŭ kelkaj diverslandaj socialistaj esperantistoj. De 1906 ĉi tiuj kutimis organizi apartan kunvenon *Kongreseto de Ruguloj* por preparoli siajn proprajn aferojn.

---

\*) En 1920 ISR reaperis, sed ne sukcesis reakiri sian antaŭan lokon en la movado. Post duona jaro ĝi denove malaperis. Eliris 6 numeroj, 72 paĝoj. Redaktor-eldonanto estis *W. Nutters*.

La unua tia kunveno okazis en septembro 1906 en Genevo. Gravega okazintaĵo! Unuafoje en la historio de la laborista movado kunvenas socialistoj diverslandaj, diverslingvaj kaj interparolas kaj diskutas sen interpretistoj, sen lingvaj mal-facilaĵoj. Unuafoje kunvenas proletoj diverslandaj, parolas unu kun la alia senpere kaj tuj komprenas sin reciproke. Kia historia momento — grandsignifa kaj multpromesa!

Se oni demandas al ni, kiuj estis la ĉeestintoj al ĉi tiu unika, mondgrava manifestacio, ni devas respondi, ke ni ne scias. Ĉu ili mem sufiĉe konsciis pri la gravo de ĉi tiu momento? Eĉ tion ni ne scias. Nur sekan, mallongan, prifaktan, raporton ni posedas pri ĝi. Per ĝi niaj legantoj devas kontentigi.

*Generala kunveno de la "ruĝuloj" esperantistaj, okazinta en Genevo la 2-an de septembro 1906.\*)*

La Kunveno oficiale malfermiĝas je la 10-a matene — ĉeestas kamaradoj el Franclando (Paris, Bellegarde, Voiron, Saumur, Gex); Britlando (Liverpool, Ipswich, Manchester); Germanlando (Frankfurt); Aŭstrolando (Tirolo); Svislando (Genève, Nyon, Zürich, Neuchatel); Pollando (Warszawa); Mangurlando (Kharbin).

Kiel sekretario estas elektita la kamarado *Fi-Blan-Go*.

Oni decidas unue ne publikigi la nomojn de la ĉeestantoj.

Verema salutas la kunvenantojn, kaj rakontas pri la cirkonstancoj de la naskiĝo de la ideo pri "Socia Revuo".

Fi-Blan-Go legas leteron de la sekretario de la Asocio "Paco-Libereco".

Verema parolas pri necesa unuiĝo de la ĉiunuancaj ruĝuloj por efektivigi la unuan revuon esperantan **LIBERAN**.

Papillon raportas pri la Grupo Liberecana Esperantista de Paris.

La tagordo venigas la raportojn pri la nuna stato de esperanto ĉe la diversnaciaj ruĝularoj. Rezultas el tiuj raportoj, ke la situacio ĝenerala, kvankam ne ankoraŭ brila, estas tamen esperoplena kaj montras la nepran necesecon de neŭtra informilo inter la diversnaciaj militantoj.

La kunveno komisias al kamarado Verema liveri al la interesatoj la precizan tekston de la decido de la kongreso de Chalons pri la uzado de esperanto en la internacia Brusela Oficejo.

La intereso estas precipe vekata de tiu fakto, ke kelkaj gazetoj (Vorwärts k. a.) diris, ke la uzado de esperanto estas malpermesata de la germana socialista estraro.

Pri la venonta internacia socialista Kongreso de Stuttgart oni konsilas al la samideanoj informi pri la eblaj delegotoj de sia lando en tiun kongreson kaj fari apud ili ĉaspecan propagandon.

Pri la enkonduko de esperanto en la laboristan klason, oni varme konsilas al la propagandistoj kaj instruantoj uzi kiel eble plej simplajn lernolibrojn kaj instrumentojn. M. V. rekomendas precipe la Ekzercaron de Zamenhof. K. B. diras, ke ĉiuj metodoj estas malbonaj por neinstruitoj. Oni devas doni al la lernantoj

---

\*) El: *Rondiranta Folio*, n:o 4. Ni ne ŝanĝis la lingvaĵon de la originalo.

interesan libron (romanon) por legi kaj nur direkti, kontroli kaj faciligi ilian laboron. N. E. rimarkigas, ke per tio la gramatiko senintence lerniĝas.

Oni konsilas al la samideanoj forlasi neniam okazon por interesi la laboristarojn pri la demando de lingvo internacia (kongresoj, strikoj k. c.).

Oni komencas disputi pri la titolo de la estonta revuo kaj por doni tempon zorge pripensadi la demandon, oni decidas rekunveni posttagmeze je la tria.

*Dua kunveno.* — Post kelkaj proponoj kaj intersaĝo de rimarkoj por la titolo de la revuo, oni akceptas:

### **"Internacia Socia Revuo".**

Efektive, la disputado montras, ke estas bezona nova radiko, ĉar la konataj radikoj, ŝajne internaciaj, kiel social-, komunist-, demokrat- k. c. havas laŭ la landoj tre diversajn signifojn, kaj la akordo estas ebلا sur neniu el ili.

La kunveno esprimas la deziron, ke plej baldaŭe eliru la unua numero. Oni decidas eldoni kvaran kaj lastan roĥdirantan folion, sur kiu oni montros la adresojn de la naciaj kunlaborantoj kaj detalos la praktikan planon financan por la eldonado de la revuo.

Oni decidas, ke la protokolo estos publikigata en la IV-a folio.

La kunveno finiĝas je la 6-a.

Fi-Blan-Go.

Dua Kongreseto de Ruĝuloj Esperantistaj okazis en Kembriĝo (Cambridge), Britio, je 13—16 aŭgusto 1907. Kiom da kamaradoj ĉeestis ĝin, ne estas konate. Estis inter ili Auerbach (Germanio), Fi-BlanGo kaj Papillon (Francio), N. P. E-f (ĉu Estivjef el Rusio?), Padfield kaj Whiteman (Britio) kaj E. Privat (Svisio).

Oni sendis al la en Stutgarto okazanta Internacia Socialista Kongreso manifest-leteron protestantan kontraŭ la malakcepto de esperanto, kiel unu el la oficialaj lingvoj de la internaciaj socialistaj kongresoj. Ĝin verkis E. Privat, N. P. E-f kaj Fi-Blan-Go. Kiel historian dokumenton ni represu ĝin ĉi sube:

Cirkulero sendita de la Dua Universala Kongreseto de la Ruĝuloj Esperantistaj al la delegitoj de la Socialista Kongreso en Stuttgart:

Kiam unu registaro, precipe registaro de l' tipo rusa aŭ turka, malhelpas kaj eĉ absolute malpermesas disvastigon de Lingvo Internacia en regataj de ili landoj, ili agas tre prudente kaj tre konforme al sia esenca naturo. La lingvo, kiu detruas aŭ almenaŭ malfortigas limojn, la lingvo, kiu efektivas internaciecon de popoloj, por ili estas signo de morto aŭ almenaŭ de grava ŝanĝigo.

Ni tion komprenas kaj ni pri tio ne miras: kontraŭe ni mirus, se estus alie.

Sed ni efektive miras kaj sentas doloron, kiam ni vidas, ke la partio, kiu sin nomas "internacia", la partio, kiu estis naskita per la epokfaranta alvoko: *Proletarioj de ĉiuj Landoj, Unuigu!* kiam tiu partio ne sole ne zorgas pri demando de Lingvo Internacia, sed eĉ malhelpas ĝin, laŭforte kontraŭbatalas sub diversaj pretekstoj kaj laŭ diversaj manieroj.

Ĉu la devizo: "Proletarioj de ĉiuj landoj, unuigu!" fariĝis tiel same sensignifa ornamo de oficiala konstruaĵo de partio, kiel la devizo: "Libereco, egaleco, frateco" fariĝis nun nur fantomoj de la francaj regnaj institucioj?

Estus tre malbona signo por la interna vivo de socialista partio, se ĝi rilate al demando pri Lingvo Internacia konservus la saman kaŝitan malamikan pozicion, kiun okupis ekzemple la rusa registaro ĝis la lasta ekstera malvenko.

Estus pli konforma al la indoj kaj ideo de la "Internacia" Laborista Socialista Partio, se ĝi en la nomo de du grandaj principoj, — internacieco kaj demokrateco — prenis sur sin la devon kaj honoron akcepti la nunan internacian lingvon por efektivigi la belan songon de l'demokrata, kontraŭprivilegia kaj kontraŭsovinsta homaro.

En la nomo kaj laŭ decido de la multnaciaj Esperantistaj Socialistoj kunvenintaj en Cambridge, Aŭguston 15-an 1907, subskribas:

F. Blangarin, W. W. Padfield.  
*Sekretarioj de la kunveno.* \*)

Laŭ propono de E-f oni decidis principe fondi Societon, kiu akceptus ISR kiel oficialan organon aŭ konsistus simple el tiuj abonantoj de ISR, kiuj volus enskribiĝi kiel membroj. Al E-f, Fi-Blan-Go kaj Padfield estis komisiata prepari provizoran regularon por tia societo.

Plie oni diskutis pri "Simplega lernmetodo de esperanto", sed ne decidis pri ĝi, starigis komisionon por esplori la demandon de Socia Vortaro kaj sendis al la en Amsterdamo okazanta Kongreso de "Libertarioj" (Liberecanoj) leteron, rekomendante al ĝi la lingvon esperanto.

La Kongreseton de Ruĝuloj Esperantistaj en Dresdeno (aŭgusto 1908) ĉeestis kamaradoj el Britio, Francio, Germanio, Norvegio, Polio kaj Rusio. Okazis 4 kunsidoj. Laŭ sciigo en ISR de aŭgusto oni preparolis i. a. la demandon: Ĉu *Internacia Socia Revuo* restos esperanta? — Ĉi tiu punkto rilatas al la fakto, ke kelkaj (malmultaj) kamaradoj post elpaŝo de ido aliĝis al tiu lingvo kaj volis idigi ISR-on.

Ŝajnas tamen, ke tiu punkto ne estis priparolata tute klare. Je la komenco iu kamarado proponis ne priparoli lingvajn demandojn: "Ni estas en Esperantujo kaj do ni estas fidelaj je esperanto."

Poste oni legis artikolon de *Auerbach* (favoran al ido) kaj respondon de la redakcio, diskutadis longe kaj konfuze kaj... elektis komisionon. Kion devus fari ĉi tiu komisiono kaj kion ĝi faris? Pri tio ni ne trovis informojn.

---

\*) Laŭ I.S.R., aŭgusto/septembro 1907. Ni ne ŝanĝis la lingvaĵon de la originalo.

Estis multaj kaj tre malsamaj proponoj pri ISR. Iu proponis fari el ISR Revuon de l'Revuoj, enpresigante nur tradukaĵojn (!), alia proponis dividi ISR je du partoj "libertaria" (anarkista) kaj socialista kaj por ĉiu parto elekti apartan redaktoron. Ĉi lasta propono estis akceptata de la kongreso, sed ŝajne la legantoj de ISR poste decidis alie; almenaŭ la revuo restis tia, kia ĝi estis ĝis tiam.

Propono ne fondi societon de abonantoj al ISR, sed *Socialistan Societon Internacian Esperantistan* estis akceptata kaj oni elektis komisionon por esplori la demandon. \*)

Sajnas, ke ĉe la kongresoj en Barcelono kaj Vaŝingtono 1909 kaj 1910 ne okazis kunvenoj de socialistoj.

Anstataŭe ni dediĉu kelkajn vortojn al la Esperanto-Kongreseto en Kopenhago okazinta de 29 aŭgusto ĝis 31 aŭgusto 1910. Ĝi estis aranĝita de la (neŭtrala) *Dana Ligo Esperantista* samtempe kun la tie okazanta *Internacia Socialista Kongreso*, kun la celo fari propagandon ĉe la partoprenantoj kaj gvidantoj de ĉi tiu kongreso. La Esperanto-Kongreseton ĉeestis ĉirkaŭ 100 personoj, plejparte ne-socialistoj. Publika kunveno, al kiu estis invititaj la delegitoj de la Socialista Kongreso kaj en kiu devus paroladi diverslandaj esperantistaj socialistoj, malsukcesis, ĉar nur kelkaj delegitoj de la kongreso ĉeestis ĝin. Nur per personaj interrilatoj kun la kongresdelegitoj oni iom propagandis nian lingvon. Krom la nomita publika kunveno okazis kelkaj laborkunsidoj, en kiuj raportis i. a. *Abrahamsen* (Danio), *W. Nutters* (Nederlando), *E. Parker* (Britio) kaj *L. Schlaf* (Germanio).

En 1911 okazis "Kongreseto de Ruĝuloj" en Antverpeno. Estis 4 kunsidoj, kun proksimume 30 partoprenantoj el 8 landoj.

Diversaj kamaradoj raportis pri la stato de la laborista esperanta movado en siaj landoj. Poste oni parolis pri ISR. "Pri la enhavo oni estis kontenta; nur malaprobinda estas, ke ĝi enhavas tiel multe da poemoj ofte tute senvaloraj. La redakcio estas petata rifuzi literaturaĵojn netaŭgajn."

En la lasta kunsido, malbone vizitita, ĉar jam multaj forvojaĝis, oni pritraktis la demandon "kion fari por enpenetrigi esperanton inter la laboristoj diverslandaj". Post longa diskutado oni akceptis proponon, laŭ kiu al la socialistoj ĉeestintaj la kongreson estis rekomendate formi tuj naciajn socialistajn sekciojn kun naciaj sekretarioj kaj krome unu

---

\*) I. S. R., oktobro 1908.

internacian sekretariojn. La samon devus ankaŭ fari la anarkistoj. Plie oni elektis internacian sekretarion por plifaciligi la klopodojn farotajn por starigi internacian unuiĝon.

La kongresintoj ankaŭ organizis internacian propagandkunvenon, kiu tre bone sukcesis. Ĉeestis proksimume 150—200 personoj. Kamaradoj el 6 diversaj landoj paroladis. Multaj laboristoj enskribigis sin por starigota loka grupo.

Ankaŭ ĉe la 8-a Universala Kongreso de Esperanto en Krakovo (1912) la socialistaj esperantistoj havis sian apartan kunvenon. Partoprenis dudeko (50?) da kamaradoj el Alĝerio, Bohemio, Francio, Hungario, Serbio kaj Polio. Oni faris jenajn decidojn: 1) La protokoloj de verdsocialistaj kongresetoj okazontaj dum mondkongresoj esperantistaj aŭ de Socialista Internacio, estu transdonataj al la redaktoro de ISR, kiu ilin arkivigos. 2) Kiel centra organo de ĉiuj verdsocialistoj estis aprokata ISR, kiun ĉiu kamarado plej efike subtenu. 3) La adresaro de laboristaj geesperantistoj ankoraŭ ne estos eldonata kiel aparta libro, sed la redakcio de ĉiu esperantista Jarlibro estos petata disponigi por tiu ĉi celo specialan rubrikon en Jarlibro. 4) Oni klopodos por akceptigi esperanton kiel ĉefan interlingvon por *Socialista Internacio*, precipe por ĝiaj kongresoj . . . La krakovaj aranĝintoj de la kongreseto ellaboros la rezolucion, kiun la *Bohema Laborista Asocio Esperantista* prezentos al la *Internacia Socialista Sekretariejo* en Bruselo. 5) Fine estis sendata salutletero al la kongreso de la *Social-Demokrata Partio* de Germanio. \*)

En Berno okazis en jaro 1913 du kunvenoj de socialistaj esperantistoj okaze de la Universala Kongreso. Ilin ĉeestis 60 personoj el 7 landoj. Oni raportis pri la movado en diversaj landoj, decidis aranĝi propagandkunvenon (kiu tamen ne okazis) kaj akceptis proponon elekti internacian sekretarion, kiu farus internacian enketon kaj daŭrigus la interrilatojn inter la naciaj asocioj, grupoj ktp. La rezulto de tiu enketo kaj, se eble, provizora regularo estus publikigotaj kelkajn monatojn antaŭ la kongreso en Parizo, kiu estis planita por la venonta jaro.

Al la *Internacia Socialista Oficejo* estis sendata rezolucio, en kiu oni petis studi la demandojn pri internacia lingvo kaj rekomendi ĝin al la venonta internacia socialista kongreso.

La membroj de *Liberiga Stelo* havis apartan kunvenon, en kiu oni ankaŭ raportis pri la movado(!), esprimis la deziron,

---

\*) Laŭ: *Kulturo*, aŭg. 1912.

ke oni ne plu organizigu laŭ tendencoj, sed ke ĉiuj laboristaj esperantistoj kuniĝu en unu internacia federacio. Oni decidis studi la demandon kaj prokrasti la starigon ĝis la pariza kongreso en 1914.

Oni vidas el ĉi tiuj resumaj raporto, ke en la priskribitaj kunvenoj oni multe parolis, sed ne multe faris. Oni parolis, proponis, decidis, sed mankis homoj, kiuj efektivigis la decidojn. Tute prave skribis A. Czubrynski, unu el la organizintoj de la internacia kunveno en Krakovo: Verd-socialistaro devas havi ian ekzekutivon, t. e. komision (komisionon) zorgantan pri la efektivigado de la decidoj kongresaj, por ke ili ne restu nur decidoj senfortaj". Ŝajnas tamen, ke la kongresintoj en Berno ne priparolis ĉi tiun punkton. Cetere tio ne domaĝis, ĉar pluaj kunvenoj ja ne plu okazis. La tondro de la kanonoj triumfis super la homa racio kaj kvarjara buĉado malebligis ĉian kulturen laboron.

---

## LITERATURO.

La unuan laboron por la proleta esperanta literaturo faris *Fi-Blan-Go* kaj R. Louis. Ĉi tiuj estis la fondintoj kaj gvidantoj de la *Internacia Asocio Paco-Libereco*, kiu celis i. a.: batali per presaĵoj (libroj, broŝuroj, revuoj, prospektoj ktp.) kontraŭ armeo, militismo, kapitalismo ktp. La eldonado de literaturo do estis por ĝi grava tasko kaj ĝi klopodis laŭpove plenumi ĝin. Kiel unuan eldonaĵon ĝi aperigis en 1906 kontraŭmilitistan broŝuron *Nova Gvidlibreto por soldatoj en ĉiuj landoj*. La aŭtoro ne estas nomita; tradukintoj estis *Fi-Blan-Go* kaj R. Louis. Ĝin sekvis *Al la virinoj*, de Urban Gohier kun *Letero pri la milito de Ĥino*, *Antipatriotismo* de G. Herve kaj *La Parlamentisma iluzio*, de C. A. Laisant. Ankaŭ ĉi tiuj tri verketoj estis tradukitaj de supre nomitaj kamaradoj. La lasta eldonaĵo de Paco-Libereco estis: *La Krimoj de Dio*, de S. Faŭre tradukita de Luis Carlos kaj F. Buokin.

Kvankam ĉi tiuj broŝuroj ne estis originalaj kaj ankaŭ el lingva vidpunkto ne estis neriproĉeblaj, ili kiel unuaj eldonaĵoj sur la kampo de proleta esperanta literaturo, tamen meritas honoran mencion.

La literatur-eldona agado de *Paco-Libereco* estis daŭrigata de *Internacia Socia Revuo*. Ĉe ĝi aperis tuta serio da verketoj de diverslandaj kaj diverstendencaj aŭtoroj. Multan laboron por



tio faris *D. Ivanski* (pseŭdonime: *D. J.*) en Munĥeno. Li tradukis: *La evangelio de la horo*, de *P. Berthelot*. Pri la esenco de konstitucio, de *F. Lasalle*. La piramido de l' tiranio, de *F. Domela Nieuwenhuis* kaj *La salajro*, de *P. Kropotkin*. Krome li verkis originalan broŝuron *Tero kaj libereco* (ABC-libreto pri la libera socialismo), kies eldono pro la milito ne efektiviĝis. Ankaŭ *W. Nutters* la redaktor-administranto de ISR faris gravan traduklaboron. Li esperantigis i. a.: *Por ataki kaj defendi* de *W. Liebknecht* kaj *La Mizeruloj* de *Viktor Hugo* (unua volumo). Verketo *La reforma mono* de *Silvio Gesell*, de *Paŭlo Staniŝiĉ* estis parte originala, parte tradukita. La aliaj eldonaĵoj de ĉi tiu serio estis: *Kio estas socialismo?*, de *E. Ferri*, tradukita de *P. S.* kaj *La forto de la fortaj*, de *Jack London*, traduko de *K. Fröding*.

Aliaj eldonaĵoj antaŭmilitaj estas: *La manifesto de la komunista partio*, de *Marks* kaj *Engels*, tradukita de *A. Baker* eldonita de *Ch. H. Kerr* en Ĉikago kaj *Laborista Klaso kaj socialismo*, de *M. Cachin*, tradukita de *L. Berland* kaj *L. Vergnaud*.

---

## PRAKTIKA UZADO.

Estas kompreneble, ke en la komenca periodo de la laborista esperanta movado, kiam la nombro da laboristaj esperantistoj estis ankoraŭ tre malgranda, kiam ankoraŭ ne ekzistis bone funkcianta internacia organizo, la eblo praktike uzi la lingvon estis multe pli limigita ol nun. La ĉefa afero estis tiutempe propagandi, propagandadi . . .

Tamen oni ne tute malatentis la praktikan utiligon de esperanto. Ĉi tion jam montras ĉi tiu fakto: la ekzisto de *Internacia Socia Revuo*. Laborista esperantisto per legado de ĉi tiu revuo ja povis informi sin pri la vivo kaj agado de siaj kamaradoj en la tuta mondo kaj per tio ekhavi spiritan profiton. Krome oni povis traduki artikolojn el ISR kaj publikigi ilin en naciaj laboristaj gazetoj. Efektive oni kelkfoje tradukis artikolojn el ISR, sed tamen troviĝis malofte sciigoj pri tio en la revuo.

Foje oni trovas en ISR proponojn kaj aludojn pri plia praktika uzado de la lingvo. En 1908 oni proponis prepari *Adresaron* de esperantistaj socialistoj kaj aliaj ruĝuloj en ĉiuj landoj por propagandi esperanton inter la socialistoj, mont-

rante la utilon de la lingvo por kaj per internacia korespondado.

Du jarojn poste iu konsilis agi laŭ la ekzemplo de la *Universala Esperanto-Asocio* kaj, se eble kune kun ĝi, starigi Konsulejojn de Laboro, kiuj liverus al laboristoj ĉiujn informojn pri laboro kaj dungado.

En 1912 *W. Thielking* klopodis ekfunkciigi instituton de "laborkonsuloj", kiuj helpus al travojaĝantaj kamaradoj, donus informojn pri labor- kaj vivkondiĉoj, ktp. Samjare li komunikis en ISR, ke la "Internacia Labor-Konsularo" jam starigis oficejojn en 21 urboj de 10 diversaj landoj. Pri la agado de ĉi tiuj konsuloj oni ne raportis en ISR. Verŝajne ili ne multon faris kaj ĉi tiu provo do ne sukcesis. Atentinda provo pri praktika uzado de esperanto por politika celo estis la aperigo de granda broŝuro *Politika Malliberulo* kun subtitolo "unutagaĵo dediĉita al la afero de la politikaj malliberuloj kun speciala konsidero al la katorgo". Per diversaj artikoloj pri vivo kaj sorto de la politikaj malliberuloj en cara Rusio, ĝi celis informi pri la inferaj situacioj en kiuj vivis ĉi tiuj kaj instigi al morala kaj materia helpo por plibonigo de ilia sorto. Ĝin eldonis d-ro *Zygmunt Marek* en Krakovo, okaze de la tie okazanta Universala Kongreso en 1912. Supozeble ĝi estis disdonata aŭ vendata al la kongresanoj.

Ankaŭ UEA klopodis fari ion en laboristaj rondoj. Ĝi starigis en 1911 *Laboristan Fakon*, kiu celis: a) plifaciligi kaj plimulti la rilatojn inter ĉiulandaj UEA-anoj-laboristoj; b) studi ĉiujn demandojn, kiuj rilatas al la starigo de praktikaj servoj por ĉiulandaj laboristoj; c) propagandi UEA kaj esperantismon ĉe laboristoj kaj laboristaj institucioj.

Por iĝi membro de ĉi tiu fako oni devis esti ano de UEA kaj alpagi 50-spesdekan (1-markan) kotizon.

La Laborista Fakoj, nomata Universala Laborista Asocio aperigis en novembro 1911 *Laboristan Bultenon*, organo de la laborista fako de UEA, senpaga aldono al la revuo *Esperanto*. Ĝin redaktis *E. Parker* en Londono. Laŭ enhavo ĝi iom similis la nuntempan esperantan *Bultenon* de la Internacia Labor-Oficejo. Ŝajne eliris nur du numeroj de ĝi. La kaŭzo de ĉi tio estis la malbona prospero de la Fakoj. En la raporto de UEA 1912—13 oni legas, ke ĝi havas tro malmulte da membroj (nur 22) por povi daŭrigi la eldonadon de la *Bulteno* kaj ke pro la sensignifa membronombro preskaŭ nenia laboro estis farebla. Supozeble oni baldaŭ likvidis ĉi tiun entreprenon, ĉar en la UEA-Jarlibro 1914 oni ne trovas informojn pri ĝi.